


14:7

✓ **AMERIKA**



**ESPERANTISTO**



SEPTEMBER, 1913

?

# HOW MANY

The Best Number of this Magazine ever issued will be

## THAT OCTOBER NUMBER !!



**CONTENTS** — 9th International Congress fully reported by European and American samideanoj — Photographs — Propaganda Articles — Complete Revised Book List — Especially Large Literary Section — Many other Important and Interesting Features.

**SPECIAL RATE 10 FOR 50c.** Leave it to us to give you your money's worth  
**DON'T GET LEFT ORDER NOW HOW MANY OCTOBERS ?**

## Short-Story Writing

A course of forty lessons in the history, form, structure, and writing of the short-story taught by J. Berg Esenwein, Editor of Lippincott's Magazine.



Dr. Esenwein Story-writers must be *made* as well as *born*; they must master the details of construction if they would turn their talents to account.

May we send you the names of students and graduates who have succeeded? And the success their letters prove is *practical*. It means recognition, accepted manuscripts and checks from editors.

*One student writes: "I know that you will be pleased when I tell you that I have just received a check for \$125 from Everybody's for a humorous story. They ask for more. I am feeling very happy, and very grateful to Dr. Esenwein."*

We also offer courses in Photoplay Writing, Versification and Poetics, Journalism; in all over One Hundred Home Study Courses, many of them under professors in Harvard, Brown, Cornell, and leading colleges.

250-Page Catalogue Free. Please address,  
**THE HOME CORRESPONDENCE SCHOOL**  
Dept. 542 Springfield, Mass.



**STANDARD EDITION, Cloth Bound**  
Postpaid for \$1.00; with NE  
Subscription to AMERIKA ESPERANTO  
\$1.50.

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.**  
West Newton, Mass.



## THE AMERICAN THEOSOPHIST

*A magazine dealing with Theosophy and Occultism, Universal Peace and the Wider Tolerance*

Official Organ of The American Section of The Theosophical Society  
Mrs. Annie Besant President  
Albert P. Warrington Gen. Secretary and Editor  
\$1.50 a year Single Copy 15 cents Foreign \$2.00  
Address: Krotona, Hollywood, Los Angeles, Cal.

### Specialisto pri la okuloj kaj la spina nervo

Okulvitroj prave almezuritaj al la okuloj.

**D-RO ANTONIO ROMITO**

410 Liberty Ave., Room 602, - PITTSBURG, PA.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

*Published Monthly by*

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)**

**West Newton, Mass.**

ONE DOLLAR A YEAR

Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)

SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj estas ĉiam prefere akceptitaj. *Oni ne resendas* neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone. Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribaŝine.

Vol. 14

AUGUST, 1913

No. 1

### EL LA REDAKCIA SANKTEJO

Eble iu pensas, ke estas pli facile, poezion tradukadi, ol ĝin verki originale. Jen plorinda sofismo. En efektiveco, ĉiu *serioza* tradukemulo scias, ke por transdoni de lingvo al lingvo, ritmo- kaj rim- havan poemon pli-malpli adekvate,—tio estas, kun la rimsistemo kaj ritmo netuŝitaj, oni devas rejeti en la fandujon la tutan poemon kaj praktike elfabriki poemon *novan*. Sed por tion fari prospere (redonante en nova formo la *efekton* de l'originalo), oni devas esti proksimume tiel alta poeto, kiel la praverkinto. Ĉu ne en niaj naciaj lingvoj la plej eminentaj tradukistoj de poezio estas samtempe la plej gloraj originalaj poetoj? Pope redonis al ni angleparolantoj Homeron; Milton tradukis el Horacio, Scott el Goethe. Tiaj ĉi lertaj tradukoj tute ne estas, nek povis esti, laŭvortaj aŭ eĉ laŭversaj, sed prezentas la nur ĝeneralan penson de l'originaloj en freŝa, sendependa stilvesto.

La tradukado de poezio prezentas apartajn malfacilaĵojn. Ĉe tio oni havas, por esprimi, ne nur pensojn, sed *sentojn*, en komplikita formo de ritmo kaj rimoj. Por fari tion prospere, oni devas ne nur, kiel ĉe prozo, plenposedi ĉiun el la du lingvoj concernataj, sed oni devas, antaŭ ĉio, *esti mem poeto*.

Sole nur tiel oni povas sukcese traduki poezion. Se oni tion ne

grandan cerbo-povon. Ree, pacience atendu! *Mi revenos baldaŭ, kaj tiam, ho, aperos la bela, tute laŭdinda, riĉenhava, Oktobra propaganda numero. Sendu vian mendon HODIAŬ—por ke vi ne forgesu! Ĝis la Oktobra—Saluton!*)

Ĉi tiun monaton ni starigas novan fakon "SUR NIA TABLO". De nun ĉi tiu fako enhavos recenzojn ne nur de Esperantaj ĵurnaloj, sed ankaŭ de gravaj artikoloj pri Esperanto kiuj montriĝos ĉe neesperantistaj ĵurnaloj. Se vi trovos ion de ĝenerala intereso tian, sendu ĝin al la redakcio, kiu pritraktos ĝin.

### INTERNE KAJ EKSTERE

**D**UOBLA devas esti nia laborado por Esperanto: interna kaj ekstera. La dua ne povas esti bona sen la unua. La unua riĉigas la duan kaj ĝin valorigas.

En la nuna tempo estas neeble, kaj ankaŭ neefike, se ĝi estus iel eble, propagandi Esperanton kiel teoriantan proponaĵon. La mondo postulas faktojn kaj faktojn ni devas montri al ĝi. Jam tio postulas de ni, ke ni konu niajn valorajn faktojn, tio estus, ke ni pli bone informiĝu mem pri la historio de nia movado, pri la uzado de la lingvo, pri ĝia praktika servado kaj ĝia viva literaturo. Jen interna laborado.

Bone informiĝante mem, ni devas saĝe kaj efike informadi la neesperantistojn, kaj uzi taŭgajn okazojn por instrui la publikon pri tiuj novaĵoj, kiuj povas plej multe aperigi Esperanton, kiel jam seriozan kaj starigitan aferon.

Estas neduleble, ke la publiko ĝenerale tute nescias pri la vera vivo de Esperanto kaj ricevas grandan surprizon aŭdante pri la nombro de niaj gazetoj, pri la statistiko de niaj novaj libroj, pri la servoj de U. E. A. k. t. p. Ankoraŭ pli miras la homoj, kiam oni klarigas al ili kiamaniere Esperanto fariĝis vivanta lingvo, kiel ĝi havas specialan spiriton, kiel tiu spirito ebligis kreiĝon de originala literaturo k. t. p. Grandan surprizon, grandan miron, iom post iom sekvas intereso kaj admiro, dum forflugis unu post la aliaj, la klasikaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto.

Tute nesufiĉe estas tiu informado de la publiko, ĉar ankoraŭ ofte tro nesufiĉa estas la informiĝado de la esperantistoj mem. Kiom da ili abonas kaj legas fremdajn esperantajn gazetojn? Kiom da ili uzas mem Esperanton por krei al si rilatojn eksterlande? Kiom da ili aliĝas U. E. A., studas ĝian instruoplenan jarlibron? Kiom da ili interesiĝas aŭ eĉ helpas je la laboro de la loka U. E. A. delegito? Kiom da ili studas la historion de Esperanto kaj legas la novajn kaj malnovajn gravajn esperantajn verkojn? Pli vigla devus esti tiu interna vivado por prepari

vere efikan eksteran laboron. Propagando devas ankaŭ esti interna kaj ne nur por ni mem ni devas kontentiĝi, sed por samlokaj esperantistoj. Ilin ni devus pli kuraĝigi, interesi, instrui, helpi por sama informigado kaj instigi al plia legado. Je kio do utilas grupaj kunvenoj, se ne al tio ĉi?

Cu ne estus eble, ke iu samideano pli informata kaj pli agema organizu ian rondon, ĉe kiu li raportos pri gravaj novaĵoj, pri ĉefaj libroj k. t. p. kaj laŭeble ankaŭ pruntedonu dokumentojn aŭ gazetojn? Cu ne estus eble havi ankaŭ iajn familiajn kursojn pri esperanta historio kaj literaturo? En ĉiu loko ja estas iu samideano, kiu povus plej utile tiel helpi la ceterajn.

Kiom gajnas la ekstera propagando de tia riĉa vivoplena interna laboro estas ja nekalkuleble! Plie, instruigante, oni pli profunde interesiĝas kaj oni pli volonte mem partoprenas la internacian esperanto-vivadon. Mirinda lernejo ĝi ja estas por ĉiaj homoj kaj vasta trezoro da noblaj interesoj. Kian grandan forton vi, Usonanoj, povus alporti en nian movadon, partoprenante pli vigle nian internan vivadon! Ni ja tiel ĝojus sentante vin ankoraŭ pli proksime per ĉiuspecaj rilatoj, aŭdante pli ofte pri viaj faroj aŭ pensoj kaj pli rekte kunlaborante kun vi por la afero. La Oceanon povas facile mallarĝigi la ofteco de niaj korespondadoj kaj la forteco de nia reciproka helpado. Kiel utile vi povus pli konigi trans la oceano multajn amerikajn rimarkindaĵojn, per Esperanto perdigi antaŭjuĝojn, kaj pligrandigi jam pretan simpation! Jam por Kalifornio plej bone sukcesis tion fari S-ro Parrish. Sed eĉ sen simila alvojaĝo al ni tre multon vi povus fari en Eŭropo kaj Azio, ĝis baldaŭ la U. E. A. delegitoj en Usono ricevos ĉiutage amasegon da informpetoj. Tiam vi faros kiel la delegito en Antverpeno, kiu organizis konsilantaron da lokaj diversprofesiaj samideanoj por lin helpi je respondado al ĉiuj leteroj.

Per tia ĉiutaga komunikado kun eksterlanduloj kaj partoprenado en la vigla internacia vivado, oni nepre akiras, ne nur novan entuziasmon por propagando, sed riĉecon da impresoj kaj spertoj, kiu donas al tiu ekstera tasko multe pli valoran kaj efikan influon. Kiom oni gajnos per tio por propagando, tiom oni gajnos per legado por stila flueco. La tutan rezultaton de la dudek sep jaroj de lingva vivado, la formadon de flua stilo, de kutimaj propraj esprimoj, k. t. p. ĉion ĉi oni akiras per legado de niaj bonaj aŭtoroj diverslandaj.

En ĵus ricevita letero usona samideano skribis en humora kaj forta maniero:

"Konsekvence, se ni multe legas la verkojn de la plej lertaj Esperantistoj diversnaciaj, ni neniel povos akiri tiun internaciecon de la lingvo, sen kiu oni neniam fariĝos bona uzanto de ĝi. La Usonano, la anglo, kiu ne atente legadas la verkojn de alilandanoj, senkonscie malbonodori-

gos (eĉ venenigos!) siajn leterojn, k. t. p., per anglaj idiotismoj. Tiaj personoj ne uzas Esperanto mem;—ili nur vestas siajn *anglajn ideojn* per Esperantaj ĉapeloj, kolumoj, jakoj, pantolonoj, ŝuoj, kaj forsendas la neleĝe naskitajn ‘cerbidojn’ en la mondon pere leteroj, gazetoj kaj ĵurnaloj. La freŝdate varbitaj Esperantistoj legas tiujn fuŝskribitaĵojn, kaj iom rajte konsideras, ke ili estas bonstile verkitaĵoj! Kiel modelojn ili samstile ekskribas al aliaj novebakitaj Esperantistoj egale nebone instruitaj, kaj pluen iradas la malŝatinda afero.”

La “malŝatindan aferon” nepre haltigas legado, kaj tiel plej utilas nia literaturo eĉ al tiuj kiuj nur vidas en Esperanto “komercan intereson”. Grandega progreso fariĝis en la esperanta gazetaro kaj libraro; unuece kaj eĉ beleco de stilo ĉiutage pli kaj pli montriĝas kaj bonaj modeloj ne mankas. Pli kaj pli oni komprenas, ke antaŭ ol montri sian propran personecon enkondukante en la lingvon novajn esprimojn, oni devas unue bone koni la stilon de ceteraj kaj same flue verki. Poste oni ja plej ofte trovas sian propran personan vojon kaj stilon, eĉ sen novaj vortoj, per riĉiga lerta uzado de niaj lingvaj rimedoj. Kiu deziras originale kaj “persone” skribi, tiu plej sukcesus akirante unue, kiel bazon, bonan stilon klaran kaj fluan laŭ la spirito de nia lingvo.

Estas vere ĝojiga fakto, ke ni ĉiujare vidas en niaj rangoj novajn lertajn verkistojn, prozistojn aŭ poetojn kaj ĝenerale ke nia movado konstante antaŭeniras al pliperfekteco kaj pliprofundeco.

Tiun rezultaton ni atingas kaj ni pligravigos ĉiam pli kaj pli zorgante ambaŭ la *internan* kaj la *eksteran* flankojn de nia laborado kaj riĉigante per unu la alian. Nenio estas pli bela ol tiu internacia kunlaborado trans montoj kaj oceanoj por ricevi kaj doni helpon, lernon kaj instruon.

EDMOND PRIVAT.

---

## DECA FESTO

VIZITANTINO—Kion vi tie havas, Elsio?

ELSIO (fiere)—Tio estas bombo kiun ni faris, kaj ni intencas eksplodigi la infanejon.

VIZITANTINO—Ho! Ho! Kial?

ELSIO—Eble vi ne scias ke la nova infaneto estas knabo.—*Life.*

\* \* \* \* \*

“Ĉu vi estas amiko de la novedzino?”

“Ne. Mi estas la novedzo.”—*Judge.*

\* \* \* \* \*

“Bonan matenon, Jako. Kiel vi kaj Nanjo progresas?”

“Ŝi ruzis kun mi, kaj mi estas forlasinta ŝin.”

“Kion ŝi faris?”

“Ŝi edziniĝis kun aliulo.”—*Judge.*

## KICKS AND KOMMENTS

"I find that I need the journal, probably more than it needs me."

"Please discontinue the Amerika Esperantisto magazine." (Editors' note: Sorry to be disobliging, old top, but our subscribers object.)

"Amerika Esp. does not fill a very large hall in Esperanto literature."

"I think your magazine is splendid. Give us some current events in Esperanto."

"La nova formato de 'Amerika Esperantisto' devus plaĉi ĉiun abonanton. Bonan sukceson!"

"I wish to say that the only paper I ever find time to read is 'Amerika Esperantisto'. Of the many papers which we have 'Amerika' is the only one which is much read by my family."

"En la vortoj de la famega Usona poeto, Ĉimie Fadden, 'via ĵurnalo estas ĉiu al la mustardo.' Hoping you are the same."

"Via redakcia laborado estas vigla, spica kaj progresema. Nia gazeto sin trovas amuziga, serioza kaj instrua. Ĝi estas tiel plena je bonajoj, kiel ovo estas plena je manĝaĵo. La koloro de la ŝelo, tamen, devas esti verda."

"The contents of the magazine are 'great' but a few illustrations would make it 'greater'. Ĉu ne?" (Editors' Note.—They're coming, brother, give us time.)

"I like the present issues of A. E. and believe same will grow even better than before, if the samideanoj will support it."

"I care very little about the dress, but I greatly enjoy a good text, and am very glad to note that the late numbers show a diminution in the use of the overworked affixes and the overstrained compounds. Your star seems ascendant."

## EL LA MALNOVA MONDO

De nia Privat-a Korespondanto

MORTO DE PROF. CARLO BOURLET.

**L**A FERVORA direktoro de la Revuo kaj prezidanto de la Pariza Grupo Profesoro Carlo Bourlet ĵus mortis post malsukcesa operacioto en somera restejo Amecy. Solena funebro okazis la 17an de Aŭgusto en Parizo kun funebra parolado de Dro. Zamenhof, kiu venis tien por la grava malgaja cirkonstanco. Por la tuta esperantistaro same kiel por Sinjorino Bourlet kaj ambaŭ junaj gefiloj, tiel subita frapigo estas malfacile akceptebla. Sajnas nekredible ke pro ia akcidenteto subite perdiĝas el niaj rangoj tiel juna, vigla, fortoplana viro, kiu ankoraŭ hieraŭ plej ageme vivadis, paroladis, bataladis ĉiam senlace.

Malmultaj homoj en iaj movadoj estus tiel agemaj, kiel estis Prof. Carlo Bourlet, kiu—bone ilustris la kutiman viglecon de moderna Parizano.

Ekster Esperantujo li estis konata, kiel tre klara instruanto pri matematiko kaj per liaj tre disvastigitaj lernolibroj francaj geknaboj lernas algebron kaj geometrion en la lernejoj. Estinte profesoro ĉe la liceo Saint-Louis en Parizo, li estis elektita ĉe la Pariza Lernejo de Belartoj kaj fine fariĝis ankaŭ profesoro ĉe Konservatorio de Artoj kaj Metioj, kie li instruis meĥanikan matematikon. Baldaŭ post lia aliĝo al Esperanto (en 1900) en tempo kiam nia movado estis ankoraŭ en infaneco, li sukcesis uzi sian influon interesante al nia afero sian eldoniston, la gravan firmon Hachette & Ko., kiu komencis publikigi esperantajn librojn. Li fariĝis prezidanto de la tiam malgranda Pariza Grupo kaj ĝin rapide kreskigis. Baldaŭ li ekfondis grupojn en la ĉirkaŭaj francaj urboj kaj sufiĉe rapide igis nian movadon publike konata per konstanta ĵurnalista reklamado en la Pariza gazetararo. Pri tio li speciale bone sukcesis okaze la ŭnuan Kongreson en Boulogne-sur-Mer en 1905 kaj la antaŭfestojn al Dro. Zamenhof en Parizo. En 1906 li fondis La Revuon ĉe Hachette & Ko. kaj en Cambridge kaj sekvantaj Kongresoj organizis brilajn literaturajn "Festojn de la Revuo." Antaŭ tri jaroj li fariĝis vic-prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato kaj kunlaboris kun Generalo Sebert por direkti en Parizo la Centran Oficejon.

Kiel ĉiuj tre agemaj kaj aŭtoritatemaj viroj, Prof. Bourlet ne ĉiam semis pacon ĉirkaŭ si kaj tre konataj estas liaj konfliktoj kun diversaj esperantaj gazetoj aŭ tendencoj. El tiuj bataletoj ofte rezultis pli da lumo kaj bono por nia afero kaj oni hodiaŭ jam ekforĝegas iliajn detalojn. Restas en nia memoro la bildo de tiu tre parizana, sprita, agema kaj parolema fervorulo por nia afero, kies ekstera propaganda laboro estis mirinde vasta. Pri lia interna influo en la movado sendube tre diversaj estas la opinioj, sed kiaj ajn ili estas, la tuta esperantistaro dolore nun sentas ke ĝi ĵus perdis unu el ĝiaj plej talentaj ĉeflaborantoj kaj plej energiaj instigantoj al agado.

Al lia kruelsubite frapita familio iras nia kora simpatio kaj al la vasteco de lia laborado nia miro kaj admiro.

MORTO DE ABATO RICHARDSON.

Veninte en Bossey apud Ĝenevo por iom ripozi kaj revizi kelkajn esp. laborojn kun nia konata samideano S-ino Milsom (E. Ramo), la sindona prezidanto de katolika esperantistaro Abato Richardson mortis pro subita malspira krizo dum la nokto la 20-an de aŭgusto en la domo de l'vilaĝa pastro.

Dolore ĉagrenas ne nur niajn katolikajn samideanojn sed la tutan esperantistaron la perdo de tiel bonkora kaj simpatia laboranto, kiu ĉiam antaŭenmetis el siaj fortaj konvinkoj tion, kio povas unuigi prefere al



tio, kio povas dividi la homojn. "Homo estu homa" li diris kaj homa li mem estis tutkore!

La Internacian Asocion de Katolikaj Esperantistoj li energie kaj saĝe gvidis kaj kreskigis en nia rondo, tiun tre gravan fakon, kiu per siaj propraj kongresoj, siaj specialaj gazetoj ktp. multege faris por tutmonda propagando de Esperanto. Plie por la tuta esp. afero mem, por ĝia interna ideo, por nia Majstro li havis tiel varman entuziasmon ke en Bruselo, kie li instruis ĉe la Instituto St. Louis, en tuta Belgujo kaj ĉie, kien li vojaĝis li ĉiun liberan minuton sian donis por helpi la disvastigon de nia lingvo. Granda amiko de UEA li estis kaj ankaŭ multe laboris por ĝi.

Tio, kio lin allogis en la Roman Eklezion, tio sama lin varbis al Esperanto: deziro al unueco inter homoj. Lia granda sentema koro vidis ĉefe la pozitivajn flankojn de ĉio. Li amis la homojn tutkore kaj volis ilin helpi.

La 22-an de aŭgusto en la poezia vilaĝeto sub la montoj urĝe avertitaj esperantistoj kaj impresata vilaĝanaro faris funebran adiaŭsaluton al tiu junkora kaj junagema sepdekjarulo kies pardonantan fizionomion ni ĉiuj tiel bone memoros.

Kompreneble la Bernan Kongreson iom surkovras malgaja ombro pro la mortoj de ambaŭ tiuj grandaj servantoj de nia sankta afero, unuflanke la fama granda propagandisto kaj konata liberpensulo, aliflanke la senlaca blankhara laboranto, katolika pastro. Ilin Esperanto ligis per bela tutkora amikeco. Kune pace ili nun ripozas.

---

## WORLD GLEANINGS

CATALONIA. A new group, Studenta Juneco, has just been founded at the "Seminario Conciliar." 100 members have already enrolled. This important fact is significant of the increasing growth of our movement among the young students of the world.

RUSSIA. As a result of the efforts of S-ro Nedošivin, the Russian Minister of Commerce and Industry has officially promised to the Peterburga Esperantista Societo a donation of 1000 rubles to support an industrial Esperanto bureau of information at the society in St. Petersburg.

At Voznosensk, Esperanto is taught officially in the high school, which has an Esperanto library of over 100 volumes and subscribes to 7 Esperanto magazines.

SPAIN. Championed by Senor Salvador Albert a member of the Spanish Parliament, a resolution has just been unanimously passed by the Congress of Chambers of Commerce, meeting in Madrid, recommending that Esperanto be taught in commercial schools.

MONUMENTO AL LA MEMORO DE WILLIAM T. STEAD  
GASTODOMO EN LONDONO POR LABORANTAJ VIRINOJ

La amikoj de la mortinta S-ro W. T. Stead—eble la plej konata kaj internacie amata el la viktimoj de la "Titanic" ŝippereo—forte deziras memorigi lian sindoneman laboron. Ili, do, opinias ke la plej taŭga monumento al tiu nobla viro, kiu ĉiam batalis por plibonigi la staton de la virinoj, estos provizi en la urbo Londono gastodomon, kie malriĉaj laborantinoj povos ricevi loĝejon kaj nutradon je kiel eble plej malaltaj prezoj.

Tiucele oni starigis komitaton sub la alta patronado de la patrino-reĝino, Alexandra. Por efektivigi la diritan entreprenon, la komitato kolektas mondonacojn po unu ŝilingo, sub la nomo de "La Silingo de la Virinoj"; kaj tiu kaso estas ekplenigita de la Reĝino Alexandra mem per donaco de du mil ŝilingoj. (Unu ŝilingo—Sm. 0, 500.)

Sciĝinte pri la afero, Dro. L. L. Zamenhof skribis:

"La entrepreno, kiu celas honori la memoron de Stead ne bezonas mian rekomendon, ĉar la nomo de Stead kaj liaj meritoj estas tre bone konataj de ĉiuj esperantistoj. Mi esperas ke ĉiu gazeto esperantista tre volonte publikigos vian alvokon."

Legantoj de ĉi tiu ĵurnalo povas sendi donacojn al la Redaktoro kiu forsendos ilin al la Komitato.

Subskribitaj

E. A. LAWRENCE,  
MARGARET L. BLAISE,  
P. BLAISE.

---

KRONIKO NORDAMERIKA

MANCHESTER, N. H. Grava loka tagĵurnalo ĵus presis kolonlongan artikolon pri la kreskado de nia movado. Oni citis multajn gravajn faktojn, kiuj estas interesplenaj al iuj legantoj kaj ankaŭ estas tre efika propagandilo por nia afero speciale dum la someraj monatoj. Ni bedaŭras ke la verkiinto ne skribis en la artikolo la adreson de la Nordamerika Esperanta Oficejo. Estas tre grava ke niaj samideanoj memoru pri tio, ĉar kredeble multaj legantoj de la tagĵurnalo volos havigi pli da informo pri la subjekto.

MONTPELIER, VT. S-ro E. S. Payson, Prezidanto de la Novangluja Esperanta Asocio, vizitis ĉi tiun urbon dum la ĵus pasinta monato, kaj estis la gasto de la Esperantaj klubanoj. La lokaj tagĵurnaloj presis longajn intervjuojn pri la afabla prezidanto, kaj multe reklamis nian aferon.

MEXICO, N. Y. La 10an de julio, okazis vere esperanta geedziĝo. F-ino Eliza Emery kaj S-ro Clarence E. Smith geedziĝis per la patro de la novedzino, Pastro S. F. Emery. Ĉiuj gastoj estas fervoraj esperantistoj. La novedzo estas vicprezidanto de la "Emery Esperanta Klubo", la novedzino estas la sekretariino de tiu klubo, kaj la pastro la prezidanto. Gratulojn kaj sincerajn bondezirojn al Gesinjoroj Smith.

NEW YORK, N. Y. En la "Outlook" tre grava ĉiusemajna gazeto de ĉi tiu urbo, aperis tre interesa artikolo pri "Los Angeles kaj Esperanto." Estas cititaj la vojaĝo de S-ro Parrish tra Eŭropo, faktoj pri la di svastigo de nia movado, kaj paragrafo, esperante, elprenita el la gvidlibro de la Los Angeles Komerca Cambro. Samideanoj kiuj deziras legi la tutan artikolon, mendu la ekzempleron por Aŭgusto 2a, de la Outlook Co., New York City, *petante ĝin pro la Esperanta artikolo*. La prezo estas 5c.

S-ro Edward Clarke estas la verkinto de tre bona artikolo kiu jus aperis en la "New York Call". Per ĝi li interesas multajn el la ĉiam rapidemaj loĝantoj en Nov-jorko. Ni scias ĉi tiun fakton pro la granda nombro da leteroj kiujn ni ricevis el tiu urbo, petante pri informo. La artikolo verkita estas vere bona propagandilo ĉar S-ro Clarke zorge citis ke la Esperanta Oficejo en West Newton, Mass. sendos anglan ŝlosilon al tiuj kiuj deziras ĝin, se oni sendus 2c poŝtmarkon. La informpetoj kaj poŝtmarkoj ankoraŭ alvenas.

PERTH AMBOY, N. JER. En la tre grava tagjurnalo "Evening News" aperis laŭdinda artikolo pri niĝa lingvo kaj ĝia utileco, verkita de la redaktoro, S-ro J. Logan Clevenger. Estas signifa kaj forta konvinkilo de la antaŭenirado de nia movado ke la plej gravaj ĉiutagjurnaloj ĉie, nun vekigās al la fakto ke "Esperanto" ankoraŭ ne signifas "matenmanĝaĵo" aŭ "nova somera trinko," sed estas vere kiel diras ni samideanoj "vivanta lingvo de vivanta popolo." La redaktoro verkis ĉi tiun artikolon kaŭze de reklamo en la "Evening News" anoncanta ke komerca firmo deziras stenografistinojn kiu scias Esperanton. Jen bona sugestio por la samideanoj kiuj estas en la komerca kampo—Dungu nur Esperantajn laborantojn.

CHICAGO, ILL. Longa artikolo aperis en "The Daily News" la plej granda vespera tagjurnalo en urbo Chicago, pri la temo "Pri Esperanto" de S-ro E. Buro.

WICHITA, KANS. La "Democrat" tagjurnalo, anoncis sian intencon publikigi ĉiusemajne, kolonon de Esperantaj novaĵoj. Ni aprobas tian metodon de propagando kaj esperas ke la samideanoj respondos kore al la peto de la redaktoro por poŝtkarta korespondado kaj abono al la "Democrat" po 25c dum tri monatoj. Ni esperas ke ĉiu sendos al li kelkajn vortojn de gratulado.

SAN FRANCISCO, CALIF. La samideanoj de ĉi tiu urbo ankorau senĉese laboras en preparado por la rapide venonta 1915a ekspozicio. La kluboj nun eldonas lokan ĵurnalon de novaĵoj pri la diversaj grupoj kaj la planoj pri la 1915a kongreso.

### SUR NIA TABLO.

Kelkfoje mi plendis al nia ĉefredaktoro ĉar mankas en Amerika Esperantisto recenza fako gazeta. Tial, kiel puno pro mia enŝovo, antaŭ kelkaj tagoj li diris al mi; "Ho, eble vi ne scias, sed de nun vi estas la recenza redaktoro," kaj en miajn manojn metis faskon da diversaj ĵurnaloj, gazetoj, gazetetoj kaj gazetontoj.

Jen problemo. Kiamaniere oni recenzas? Mi ne scias! Tial, sen scio, sen sperto, sen antaŭjuĝo, mi eklaboros.

Unue, ni konsideru la esperantan eldonaĵon enmase. Poste, ĉar spaco mankas ke ni povos laŭvice konsideri la bonaĵojn de ĉiu aparta ĵazeto, ni eltiros, aŭ penos eltiri, nur kelkajn juvelojn el la amaso.

Esperanta ĵurnalaro, simile al la Esperantistaro mem, sin dividas en du klasojn; eminentuloj,—kaj la ceteraj. Ĉar la eminentuloj jam sufiĉe laŭdas unu la alian, ni pripensu,—la ceterajn. La gravaj gazetoj diras ke estas tro multe da malgranduloj, kiuj ne povas mem ekzisti, kaj kiuj malhelpas la ekzistadon de la fortuloj. Mi ne tute konsentas al tio. Eĉ malgranda eldonaĵo, malbone presita, maldika, kaj mallonge vivanta, ludas sian humilan rolon, aldonas eron al ĝenerala propagando, kaj mortinte, postlasas kelkajn paŝosignojn, kiuj eble gvidos iun vaganton al la esperanta vojo. Al ĈIU estas iu senkulpigo por ekzisti, neescepte la palan, dubedolĉan infanon de unu grava propaganda societo, kiu laŭ naiva konfeso de ĝia prezidanta Moŝto, povas nur vivi per rimedoj de kukolido,—en la nesto, kaj nutrita de fremda kaj malsaĝa birdo. Se mi priskribos ĝin juste oni rekonos ĝin; se maljuste, neniu rekonos ĝin, ĉar ni nomos ĝin, anonime, "Kukolido."

Kolekto de diversaj naciaj gazetoj estas tre alloga, kaj ekstere, kaj interne. Ĝi elmontras diversajn individualecojn, paperajn, presajn, presliterajn, k. t. p. kaj ĝia enhavo prezentas grafikan bildon de nacia pensmaniero, parolmaniero, kaj vivmaniero. Ne estas iu pli bonega propagandilo ol plena kolekto da tiaj gazetoj; ju pli stranga, des pli atentiga. Ĝi elokvente parolas la realan bezonon de Esperanto, ankaŭ la disvastigon de nia kara lingvo, en la malproksimajn angulojn de la mondo. Ĝi portas malesperon al la ambiculoj, aŭ pliboniguloj, kiuj el kesto aŭ el malordigita cerbo, eltiras novan helplingvon, kaj diras al tiaj; "jen realaĵo, kia espero al infanaĉo, tia la via?" Vivu la malgrandaj kaj malfortaj gazetoj; mortinte ili restu ŝtonoj sur la ĉiam-daŭra, ĉiamkreskanta monumento al la Zamenhofa lingvo.

Nu, ni recenzu; Sur la tablo kuŝas amaso da eldonaĵoj, tute senorde. Ni prezentu ilin al vi, tute laŭhazardo. Se inter ili vi ne trovas ĉian dorlotaton, kulpigu vian redaktoron,—aŭ la mian, kiu ne sendis, aŭ ne transdonis ĝin.

Je la supro sin trovas griza maljunulo, unu el niaj praavoj, malam-

pleksa, bone presita, vera aristokrato, enhavanta ne sole la kremon de nia literaturo, sed multon da diversaj artikoloj kiuj interesos la tutan esperantistaron, bonegan kaj laŭfundamentan redaktaŭ kolonon, la bonhumorajn "Flugfolioj," kaj kredeble proteston kontraŭ "heziti," kaj predikon pri internacia organizo. Al kiu ne legas "Lingvo Internacia" mankas multo.

**DIA REGNO.** Tiun gazeton mi vidas je la unua fojo, kvankam ĝi jam havas ses jarojn. Ĝi estas bone presita gazeteto, oficiala organo de K. E. L. kaj celas peresperantan disvastigon de Kristana misio. Ĝi devus trovi grandan intereson, kaj liberan subtenon inter la kelkaj ligoj de Kristanaj junuloj.

**KURACISTO.** Oficiala organo de T. E. K. A. Ne la plej granda, sed tamen, la plej grava medicina gazeto sur la mondo,—ĉar ĝi sole estas vera internacia gazeto. Ĝia enhavo estas tute originala, interesplena, kaj la kuracisto kiu ne legas ĝin, maltrafas unu el la plej gravaj utiloj de sia konado de Esperanto.

**LA VERDA STANDARDO.** Oficiala organo de la Hungarlanda Societo. Ĝi estas okjara infano, kaj eble mi devus preterpasi ĝin, tial ke ĝia enhavo rajtas ĝin ke ĝi estu nomata inter la eminentuloj. Tamen, mi devas aprobi la saĝan rezumon, sub titolo "Diversaj Tendencoj," kiu trafte pritraktas la demandon pri interna organizo kaj la malhelpoj pro indiferenteco al la centra kaj aliaj societoj. Jen du paragrafoj, kiuj, skribitaj pri la Hungaroj, ankaŭ egale bone priskribas du klasojn da Usonaj samideanoj.

"Estas inter ni samideanoj, kiuj vidante la neceson de ia organizo, pensas, ke la sola kaj nepre necesa formo de la organizado estas: la lokaj grupoj. Ĉi tiuj samideanoj gvidas kursojn, verkas artikolojn en la lokaj gazetoj, verbas membrojn por la grupo, kolektas librojn por la grupa biblioteko, aranĝas amuzajn kaj propagandajn festojn. Ili do ĉiurimede plenumas la taskon de la loka propagando, sed nur tion. Kiam oni parolas al ili pri aliĝo al la tutlanda societo, ili tiritante la ŝultrojn, eble eĉ kolere kontraŭdiras: "Kial ni sendu tri aŭ kiom ajn da kronoj po membro al la alia societo, kiam ni mem ne havas sufiĉe da ĝi?"

\* \* \* \* \*

"Kaj fine ni havas ankaŭ trian specon: la internaciemuloj aŭ kiel ili sin nomas "la internaciistoj". La internaciisto male, retiras sin en sian ĉambron kaj tie legas kaj skribas siajn leterojn eble eĉ artikolojn de kaj por alilandaj samideanoj, aŭ gazetoj, abonas eksterlandajn gazetojn, aliĝas al internacia societo de iaj—istoj, de U. E. A. k. t. p. Sed li ne vizitas la grupajn kunvenojn, ne provas propagandi inter la konatuloj (inter la atingeblaj homoj) ne zorgas pri la propralanda societo kaj gazeto kaj plej ofte neniam parolas Esperanton kun vivanta homo, aŭ eble iur babilante. Se escepte li faras ankaŭ propagandon, li pagigas per la kursano (ofte nur kursano) unu spesmilon, ensendas ĝin al U. E. A. kaj poste transdonas al la komencanto la—jarlibron."

En la Standardo estas dekseks ampleksaj paĝoj, tute egale atentigaj, kiel la cititaj paragrafoj. Bonega propaganda organo, ĉu nacie, ĉu internacie.

El la surtabla amaso "kukolido" elŝovas sian kapon. Kvietiĝu birdeto, mi atentos vin laŭinde!

**UKRAINA STELO.** Sanplena kaj fortega suĉinfano okmonata.

Pro manko de supersignitaj presliteroj la eldonisto anstataŭas la apostrofon. Post momento, oni povas legi la vortojn egale bone al supersignita presado. Ni esperu ke la malbeninda "h" por ĉiam malaperis de esperanta presarto. La Stelo enhavas multe da interesajoj kaj beligas siajn paĝojn per kelkaj kliŝaĵoj. Gratulojn al la Ukrainaj samideanoj pro ilia organo. Longtempe ĝi vivu!

SCIENĈA GAZETO. Eminentulo; enhavas diversajn sciencajn artikolojn kaj taŭgas subtenon de ĉiu scienculo kaj sciencamanto.

GERMANA ESPERANTISTO. Ankaŭ eminentulo. Aperas duonmonate; unu propaganda numero, kaj unu literatura numero. Bone presita, bele ilustrita, plenata de amaso da interesajoj. Meritas lokon sur la tablo de ĉiu propaganda societo, kaj pliriĉigas la kolekton de ĉiu privatulo.

VEKIGO. Franca okmonata infano, celante la defendon de Esperanto. La kuranta numero estas interesa pro la enhavata letero el Bulgardo, subskribita de Ivan H. Krestanof. Nuntempe, persona letero de tiu malfeliĉa lando vivigas la tieajn kondiĉojn, konkretigas kaj realigas la personan suferadon.

THE BRITISH ESPERANTIST. Eminentulo. Grava organo de grava propaganda asocio. Ĝi ne bezonas mian laŭdon.

Silentĝu kukolido! Eĉ se vi volas aroganti pro via parenco al eminentulo, tamen, multe el la subtenantoj de tiu eminentulo ne estas egale fieraj pri la parenceco. Estu pacience, ĝustatempe mi fortordos vian kapon!

LINGVO KOSMOPOLITA. Versajna malamiko al Esperanto. Bojadas je nia kara lingvo, alkuras al ĝi kvazaŭ volante diŝsiri ĝin membron de membro, tiam, svingegas sian voston, lekas ĝian manon, kaj poste, haregoj starantaj, defendas ĝin kontraŭ ebla atako. Vivu tiaj malamikoj!

AMERIKA ESPERANTISTO. Versajne la redaktoro ne intencis enmeti sian idon inter la amaso, sed tio farita, ĝi eniru en mian muelilon. Iaokaze, laŭ mia sciado, la mia estas la unua recenzo de tiu gazeto, kvankam ĝi nun vivas je sia sepa jaro. Nu, kion mi diros? Dum ĝia mallonga vivo ĝi jam havis kvar gepatrojn. Ĉiu patrino vestis ĝin per malsamaj vestoj; ĉiu patro enmetis en ĝian cerbon malsamajn ideojn. Ĝi ja suferadis pro ĝia malorfeco! Tamen, ĝi ĉiam estis bonkora infano, enhavas multe da bonegaj emoj, kaj estas tute aminda. Ĉar de longe ĝi estas tia sovaĝuleto, kaj ĉar ĝi nun trafas la lernejan aĝon, ĝiaj nuntempaj gepatroj saĝe konsentas ke ĝia estonta instruado ne estu tute parenca, kaj tial, havigis al ĝi kelkajn eksterfamiliajn instruistojn, kiuj prizorgos specialajn partojn de ĝia estonta edukado. De nun, vi povos vidi pliboniĝon, kaj ne estas preterespreble ke, en la daŭro de kelkaj jaroj, oni nomos ĝin inter la eminentuloj, kaj, honoro super ĉiuj honoroj, eble iu el niaj Eŭropaj gazetoj recenzos ĝin pli amplekse, ol; "Ankaŭ ricevitaj, k. t. p."

Pepas kukolido; "Mi ankaŭ, ornamita per kelkaj alligitaj aglaj plumoj, flugaĉas super via bela lando." Ho birdeto! Ĉu vi NE silentos! Mi jam promesis al vi laŭvican atenton!

OFICIALA GAZETO. Eminentulo. Tiel necesa kaj tiel intereseplena kiel vortaro. Malgraŭ la dormigema karaktero de multe el ĝia enhavo, ĝi ankaŭ ludas gravan rolon, pro ĝiaj raportoj de la L. K. kaj

aliaj komitatoj. Kiu volas sciigi kion fari, kaj kion ne fari, devus legi la Oficialan Gazeton.

REVUO. La sola tute literatura gazeto inter la esperantaj eldonaĵoj. Enhavas la gravajn verkojn de D-ro. Zamenhof, kaj kalkulas intersiajn kunlaborantojn kelkajn aliajn eminentulojn. Ne taŭgas por unua legolibro, sed multe valoras al sperta Esperantisto kiu volas konatiĝi kun bonstila Esperanto.

ESPERANTO. Tenas tute unikan lokon inter la ĉiuj periodaj eldonaĵoj. La sola novajjurnalo kiu trafas kaj pritraktas ĉiun landon sur la mondo. Ne pretendante esti, aŭ literatura, aŭ propaganda gazeto, ĝi bone respondas al ambaŭ klasigoj. Pro ĝia ellaborado de utilaj rimedoj por interrilatoj internaciaj, ĝi fariĝas la plej grava propagandisto; kaj en sia neoficiala parto ĝi prezentas abundon da bonega materialo el la plumoj de la ne-ankoraŭ- eminentuloj, sed tamen, materialon, kiu, pro intereso, pro bonstilo, kaj pro merito, estas ne malpli interesplena ol tiu el la plumoj de eminentuloj. Mia sola kritikajo estas, ke, dum kelkaj jaroj ĝi tro multe suferigis "Juna Werthe", kaj laŭ nunaj signoj, tiu kompatinda junulo suferados tiel longe, kiel la "Vaganta Judo."

Nu, mi trafas la profundon de la fasko, kaj mi rimarkas ke ankoraŭ restas multe da bonegaj gazetoj, kiujn mi ne citis. Alian tempon, se pro la nuna klopodo Sro. Ĉefredaktoro ne fortranĉas mian kapon, mi pritraktos la ceterajn.

Ho jes! Pardonu al mi, kukolido, mi promesis atenti vin. Por ne malzorgi vin mi rakontos al vi anekdoton, kies moralo klarigas sin.

Foje, instruisto ekzamenis klason pri historio, kaj, al iu mallaborema bubo li faris demandon pri unu el la antikvaj reĝoj, kies reputacio,—eĉ laŭ antikvaj moralaj kodoj,—ne estis tute senmakula. La bubo hezitis (pardonu, Sro. Cart,—*sanceligis*) balbutis kaj silentis. Diris la instruisto; "Prave knabo; ju pli malmulte oni diras pri li, des pli bone!"

Ko Fo.

---

## ESPERANTO FRAMASONA

---

The New England Craftsman for August contains a "Circulero" concerning this international organization of Esperantist Free-masons, which held its second annual meeting in connection with the Berne Congress. Every member of the Craft should unite with this important organization. Annual dues are 50 cents and may be paid through P. M. J. Hiram Pearson, 333 State House, Boston, Mass.

W. Bro. Pearson will be glad to give any further information on request.

In the same number of the Craftsman are two other articles of note; one upon International Freemasonry; the second "Is This a Dream? A Nation of Masons Proposed". Esperanto is essential to the full realization of either one of these projects and will in time form the connecting link which binds together the various National Grand Lodges. The teachings of toleration and brotherhood are much the same in both the Esperanto and Masonic organizations.

## OFFICIAL COMMUNICATIONS

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikaĵojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.

### The Esperanto Association of North America

Central Office : Newton Center, Mass.

---

#### ORGANIZATION

---

Business requires that three times a week I cross Boston Harbor. The other day I passed the dock of one of our great ocean liners just in time to see a boat drill. The boat was swung from the davits awkwardly, was jerkily lowered into the water, sometimes bow down, sometimes stern down; once in the water each member of the crew pulled his oar in his own fashion; there was no harmony and a crew of husky men made indifferent progress through the water.

In the line of the ferry-boat is the berth of one of our Revenue Cutters, part of whose duties is the rescue of coastwise ships in distress. It is a pigmy compared to the liner, manned by a crew of youth, apparently inferior in size and strength to the men on the liner. I have also seen a boat lowered from the cutter. It descends swiftly and smoothly from the davits, lights on the water like a feather and swiftly moves away with oars in perfect unison, a pleasing sight and a beautiful example of the increased efficiency to be gained by concerted action.

In case of ocean peril which would you rather see coming to the rescue? The mammoth steamer or the little Government boat?

The same difference in accomplishment holds true in every path of life, whether business, sport or intellectual advancement. The key note of success is organization.

An analysis of the progress of Esperanto in the United States is a striking example of the truth of this statement. Sixty percent of the Esperanto strength is in three of the eleven Divisions of our Association, embracing one-twentieth of the territory and three-sevenths of the population, and these three divisions are the only ones of the eleven which have a complete district organization. Of these three the oldest and most fully organized contains approximately 30% of the membership of the association, one-sixtieth of the area and one-tenth of the population.

New England is conservative and not inclined to run to fads; its proportion of foreign population is comparatively small and the true cause of the success of Esperanto in this Division is to be found in the completeness and harmony of its organization. This Division is strong enough and complete enough to stand as an independent organization, but



from the beginning it has stood as an active and loyal supporter of the National Association. It recognizes the importance of unity of purpose and harmony of work in national propaganda and therefore has merged itself in the larger and broader organization. The same combined loyalty and activity in other divisions would result in a much more rapid spread of Esperanto and we should take the place among world organizations which belongs to us.

It is plainly evident that but a small proportion of those who know Esperanto are connected with any organization, and it is equally true that there are many local groups whose work is purely local and which are unknown outside their own narrow limits; each is pulling its oar in its own way and the result is slow progress. Ultimate success will depend upon perfect team work and absolute unity of purpose.

Our work embraces some more than three millions of square miles, many of our groups and district organizations are widely separated geographically; it is therefore of the utmost importance that we should have some central organization to which we can turn for information and which in matters of national importance shall be a representative body of *all* the Esperantists of Usono. With our separation from each other the majority of our work must be done as individual units and the general gatherings will of necessity have more or less of a local character, but there are times and occasions when we can act only as a national body. Ultimate recognition by the Government; the educational world, the business world and the Esperanto world, will be not of the local or district groups, but of the Esperanto Association of North America.

